

**AMERIKA**


**ESPERANTISTO**



MARCH, 1914

ENHAVO

	Paĝo
A Letter Received .....	19
Chicago—July, 1914 .....	23
El La Redakcia Sanktejo .....	3
La Perdita Hundo .....	7
La Tri Altaj Amerikanoj .....	24
La Vagantoj .....	32
Letero el Eŭropo .....	4
Mi Rekompencos .....	13
Nella .....	11
Novaj Libroj .....	30
Pensoj de Saĝuloj .....	24
Pri Sklavoj kaj Rajtoj .....	19
? ? ? ? .....	29
Radio-Telegrafio .....	25
Sur Nia Tablo .....	26
World-Gleanings .....	22
World-Peace and a World Language .....	20



Botoj, Ŝuoj, Sandaloj, Pantofloj,  
Kaŭĉukaj Ŝuoj, Ŝtrumpoj. Ĉiuj  
eksklusive laŭ la tipo  
'Naturformo.'

**HOLDEN FRATOJ,**

3, Harewood Place,  
Oxford St., London, W.

Katalogoj Senpage.

ONI HAVAS bonegan okazon por akiri daŭrajn kaj prosperajn hejmojn sur riĉa akvumita tero je la jenaj oportunaĵoj:

Estas lando kie

1. Grandegaj rikoltoj neniam mankas
2. Bonega fervoja kaj perakva transportado estas uzebla
3. Senlima vendado estas facile atingebla
4. Malgrandaj impostoj kaj bonaj lernejoj estas kutimaj
5. Centra loko certigas gloran estontecon
6. Konstanta kaj plensufiĉa akvovizito ĉiam sin trovas

Tia estas la valo de la rivero Columbia en la ŝtato Washington, kiu ne povas esti superita laŭ la Pacifika marbordo de Ameriko.

Ciu kiu interesiĝis por havigi tian lokon por konstrui hejmon kaj vivi feliĉe bonvole adresu informpeton al

**SANDERSON & PORTER**

ĉe THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.  
West Newton, Mass., Usono

If you have the great desire to write--the usual sign of inborn literary talent—careful study of the twice-monthly numbers of THE EDITOR will enable you to produce and sell manuscripts. Each number contains inspiring and informative articles by editors and writers on important phases of literary craftsmanship. Vital questions are answered in the "Questions and Answers" Department. Each number contains, in "The Literary Market" Department, news of opportunities to sell all kinds of literary material.

Twice-monthly

\$1.50 a year

\$ .10 a copy

THE EDITOR, Box E, Ridgewood, N. J.

# LA MOVADO

L'ESPERANTISTE FRANCAIS

Oficiala Organo  
de la Societo Franca por la propa-  
gando de Esperanto

Publikigas informojn pri la or-  
ganizado de la Xa Universala Kon-  
greso de Esperanto en Parizo, 1914,  
la Pariza vivado kaj aliaj plej in-  
teresaj aferoj.

Ĉiuj gesamideanoj, precipe la es-  
tontaj gekongresanoj, devas do legi  
ĝin.

Jara abono Francujo; Fr. 2, 50

Alilando: Fr. 3, 25—Sm. 1,300

41 Blvd St. Marcel, Paris, Francujo

Sendo de la lasta numero kon-  
traŭ unu internacia respondkupono.

## LA ONDO DE ESPERANTO

MONATA ILUSTRATA REVUO  
(fondita en la jaro 1909).

Ĉiu jarabonanto ricevos *senpage* la  
libron:

### "ORIENTA ALMANAKO"

*el la lingvoj japana, ĥina, araba, hinda,  
sanskrita, persa, armena, kartvela k. t.  
p. k. t. p.*

"La Ondoj" aperas akurate la 1-an datan,  
novstile. Ĉiu n-ro havas 16—24 paĝ.  
Formato 17x26. Bela kovrilo.  
(Poŝtk. ilustr.)

Sendu abonpagon (\$1.10) alla *Ameri-  
can Esperantist Co., West Newton, Mass.*

## TO NON-ESPERANTISTS:

Ask your enthusiastic Esperan-  
tist friends for a small English  
grammar of the language. Every  
*real* Esperantist carries a number  
of this handy little propagandilo.

25 Keys for only 25 cents. 100 for  
only One Dollar.

**The American Esperantist Co., Inc.**  
West Newton, Mass.

## DEZIRAS KORESPONDI

[Unufoja anonco kostas 20c. (40 Sd.) por ĉiu  
linio. Kvarfoja anonco kostas 50c. (1 Sm.)  
por ĉiu linio. Linio enhavas proksimume 40  
literojn, punktojn aŭ spacojn.]

Multaj instruistoj kaj gestudentoj vo-  
las korespondi kun ge-samideanoj  
en Usono kaj fremdaj landoj.  
Adresu: S-ro P. M. Schuyler, Estro  
de Lernejoj, Pickford, Mich., Uso-  
no. 6

S-ro C. Seret, 109 G de rue, St. Just  
des Marais, oise, France, P. M. 3

S-ro Josefo Demjanenko, Marista  
Hospital, Vladivostok, Russia. 4

S-ro T. E. Petrov, Tobolsk Bolš.,  
Arhangels n. 81, Russia. 3

S-ro St. Emeljanov, Blagoveščensk,  
Sadovaja 17, Siberia, Portretoj;  
I. P. K. 3

S-ro L. Philippe, 159 Voisinhen Beau-  
vais oise, France, P. K. 3

## POLA ESPERANTISTO

Monata gazeto, aperadas okan jaron,  
ĉiam pliinteresigante sian programon.

En 1913-a jaro "P.-E." krom 12 ilus-  
trataj, zorge redaktataj numeroj en  
klasika, pure fundamenta Esperanto,  
donos al siaj abonantoj senpagan:

### "LITERATURAN ALDONON"

(200 paĝa volumo)

Sendu abonpagon (\$1.40) al la  
**American Esperantist Company, West  
Newton, Mass.**

## Foreign Magazines

Twelve copies, our selection, back num-  
bers, for only sixty cents

**The American Esperantist Co., Inc.**  
West Newton, Mass.

## INTERNACIA MONATA GAZETO

### ORIENTA AZIO

de lasta Novembra numero aperas re-  
gule kun pli beliga formato; ilustritaj  
de ligno-gravuraĵoj kolorigitaj, kaj la  
abonprezo estas:

jarabono, Sm. 1,400; unu aparta  
numero, Sm. 0,20; provnumero,  
respondkupono.

(Oni ne akceptas poŝtmarkojn krom  
Japanaj.)

Adreso: "Sekaigo-ŝoin" Oosakima-  
ĉi, Ebaragun, Tokio, Japanujo.

# FOR THE GOOD OF Esperanto and Fraternalism

---

To every reader of Amerika Esperantisto, who is a member of F. & A. M., I. O. O. F., K. of P., B. P. O. E., or other secret fraternal order,

## GREETING:

Please send your name and address, order to which you belong, degrees and offices which you have attained, your political and church affiliations if any, your age, education or training, profession or business, etc.; and if you are the man we are looking for, you will receive some information of interest to you.

Address: CHARLES B. FROST,  
c-o American Esperantist Co.,  
West Newton, Mass.

---

NOTE—I am fully acquainted with the proposition referred to above and willingly assure our readers that the advertiser is well and favorably known, with a proposition of great interest to any man interested in fraternalism, internationalism and Esperanto. All letters, which should be in detail on every point mentioned, will be treated by him as entirely confidential.

Signed ERNEST F. DOW,  
President American Esperantist Co.

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)

WEST NEWTON, MASS.

ONE DOLLAR A YEAR Eksterlande \$1.25 (Sm. 2.50) SINGLE COPY TEN CENTS

Mallongaj verkoj, tradukajoj kaj novajoj ĉiam prefere akceptitaj. Oni ne resendas neakceptitajn manuskriptojn, se la sendinto ne kune sendis la resendpagon. La Redakcio konservas por si la rajton korekti manuskriptojn laŭbezone.

Oni donos la preferon al manuskriptoj skribitaj skribmaŝine.

---

---

Vol. 15

MARCH, 1914

No. 2

---

---



### EL LA REDAKCIA SANKTEJO



Ĉi tiun monaton ni starigas novan fakon. Ni intencas ke **Amerika Esperantisto** estu ne nur la organo kaj ilo de la Internacia Lingvo, sed ankaŭ vera Mondgazeto. Tiucele la sekcio "La Veturantoj" komenĉiĝas. Ni deziras la tutan legantaron kiel kunlaborantojn kaj petas al usonaj kaj eksterlandaj abonantoj, legante sian tagĵurnalon aŭ preferindan nacilingvan gazeton, serĉu interesajn elĉerpajojn por **Amerika Esperantisto**. Kompreneble ni ne povos uzi ĉiujn ricevitajn, sed la unuaj kaj plej bonaj presiĝos en la ĵurnalo. Pli da vera internacieco kaj montrado ke Esperanto jam utiliĝas por dissemi tra la tuta ter-globo la naciaĵojn kiuj alie sin malkovrus nur en sia propra lando: jen la programo. Ni esperas ke tiu fako sin pruvos interesa kaj ni bonvenos sugestiojn kaj artikolojn por plibonigi ĝin.

## LETERO EL EŬROPO

De Nia Privat-a Korespondanto

**E**N Parizo tre ageme laboras nun la organizantoj de l' Dekaj Kongreso kaj oni povas ilin gratuli, ke per siaj klopodoj ili sukcesis akiri garantian kapitalon de \$10,000 kaj ricevi jam preskaŭ unu milon da aliĝoj al la kongreso.

Ja tre lerte niaj parizaj amikoj scias devigi la homojn aliĝi nun al la kongreso. Ili ĵus komencis eldoni belan kongresan gazeton kiun senpage ricevas la aliĝintoj. Sed se vi aliĝos en Aprilo vi ricevos la numerojn de Aprilo, Majo, Junio kaj Julio, sed ne la antaŭajn. La logika konkludo estas do: aliĝu tuj por ricevi ĉiujn numerojn de la gazeto. Plie la kongreskarto kostas \$3 (por familianoj \$2). Sed se vi aliĝos post Majo vi pagos \$5, do ankaŭ tial: aliĝu tuj por ŝpari \$2. Niaj parizaj amikoj estas pravaj ĉar plej malfacile estas organizi kongreson kiam oni ĝis la lasta semajno antaŭe nescias ĉu ĉeestos mil, du mil aŭ tri mil personoj. Mi ne dubas ke miaj usonaj samideanoj jam multnombre aliĝis al la Dekaj. Ĝistos por ili ne tro multekosta vojaĝo, speciale se ili jam frue rezervas kajutojn sur la ŝipoj. Kial E.A.N.A. ne organizas Karavanon al Parizo? Se kvindeko da usonaj propagandistoj havus kongreseton dum unu tuta semajno sur transatlantika ŝipego, mirindaj geniaĵoj povus elŝpruci por la estonta agado. La kosto de la vojaĝo duaklase de Nov-Jorko al Parizo estas \$50 ĝis \$60. Por \$150 do iu ajn usona samideano povas komforte vojaĝi Parizon kaj ĝui la tutan kongreson. Nepre pripensinda afero, ĉu ne?

Unu tutan tagon de la kongresa semajno dediĉos la organizantoj al specialaj kunsidoj aŭ Fakaj Kongresetoj kun vizitoj al eminentaj parizaj samfakanoj. Sendube tio estas bonega ideo kaj estus rekomendinde, ke jam nun ĉiuj samideanoj klopodu por prepari brilan sukceson de tiuj kongresetoj.

Ĵus aperis en la oficiala bulteno de l' tutmonda estraro de Y.M.C.A. la jena decido:

“Por respondi al petskribo de dudeko da membroj de Kristana Unuiĝo de Junaj Viroj, kunvenintaj dum la IXa Kongreso de Esperanto en Bern, la aganta komisiono de l' tutmonda komitato decidis esprimi sian bonvolon kuraĝigi la disvastigon de esperanto-studado kiel solan praktikan metodon por iom post iom enkonduki tiun lingvon por la universalaj kongresoj de Y.M.C.A.”

Ĉar en Usono la Y.M.C.A. estas tre forta, utile estus profiti

tiun aŭtoritatan decidon por viziti la lokajn estrarojn de tiuj asocioj kaj komenci novan specialan propagandon de paroladoj kaj kursoj.

### Esperanto kiel Instruilo

**E**STAS nedubeble, ke lingvo valoras grandparte tiom, kiom valoras la pensoj de l' grupo da homoj, kiuj ĝin parolas. Same estas por Esperanto. Multfoje mi jam ripetis ĉi tie kaj aliloke, ke la valoro de nia lingvo por la mondo ĉefe dependas de tio, kion ni metas en ĝin, de tio, kion ni alportas per ĝi. Por eviti la konkurencon de granda nacia lingvo kiel internacia komunikilo, ne sufiĉas, ke ni montru neŭtralan kaj tre simpligitan lingvon; necese estas, ke ni povu montri sumon de profitoj tuj akireblaj per ĝi, same kiel per nacia lingvo. Tiuj profitoj devas esti same diversaj. Estas rekte monaj profitoj, estas moralaj kaj intelektaj profitoj, estas sociaj profitoj.

Kial ekzemple Ĥino aŭ Japanon allogas la angla aŭ la franca lingvo pli ol Esperanto tamen multe pli simpla kaj logika? Ĉar tiu Ĥino aŭ tiu Japano ja scias, ke studante la anglan aŭ la francan lingvon li povos jam vojaĝi en kelkaj gravaj landoj, legi multajn el la plej gravaj verkistoj kaj konatiĝi kun vasta parto de l' okcidenta kulturo.

Nu ni ja rajtas montri al tiu Ĥino aŭ al tiu Japano, ke per Esperanto li povas vojaĝi multe pli malproksimen, fakte tra la tuta mondo jam nun, kaj ke, eĉ restante hejme, li povas komuniki kun ĉiulandaj homoj per korespondado kaj akiri iom de l' tutmonda kulturo legante la esperantan literaturon.

Nu tiun "iom" ni devus ĉiam plivastigi kaj pliprofundigi por doni pli da "pezo" al nia lingvo. Tio, kion U.E.A. sukcesis fari sur la materiala, praktika kampo, devus nun esti same orde farata ankaŭ sur la mondkampo de la penso.

Estas plej dezirinde, ke tre baldaŭ Ĥino aŭ Japano povu en esperanta literaturo trovi la ĉefajn elementojn de nia okcidenta instruado kaj ke ni, okcidentuloj, povu ankaŭ trovi la esencon de ilia orienta pensa trezoro. Tiam ni povos pli efike kunlabori al moderna esprimo de ankoraŭ pli ĝenerala, tutmonda homa kulturo, por kiu nia lingvo estas jam nature antaŭdestinita.

Se ni havas ankoraŭ multe por fari por plenigi la mankojn en tiu fako, tio ne signifas, ke absolute nenion jam pretan ni havas. La ĉefa kaŭzo, kial ni ne plenigas tiujn mankojn tiel facile kiel dezirinde, estas ĝuste, ke tion, kion ni ja havas, ni nek sufiĉe konas, nek sufiĉe profitas.

Jam multon faris esperantaj eldonistoj kaj gazetistoj por tiu celo, sed nur tre malmulton ni faris por ilin subteni. Kiam mi predikas: uzu nian lingvon! oni kelkfoje respondas al mi: "Kiel mi povus ĝin uzi? Mi nek vojaĝas, nek korespondas alilande." Nu, se nek via korpo, nek viaj vortoj transiras la limojn de via lando, mi esperas almenaŭ ke via penso sin ofte liberigas de tiuj limoj. Legu, multe pli legu tion, kio aperas en Esperanto. Instruu vin mem per nia lingvo, profitu la mirindan okazon konstante aŭdi la voĉojn de ĉiulandaj homoj, kiuj vin informas pri siaj cirkonstancoj, siaj lokoj, siaj naciaj aferoj aŭ esperoj. Almetu la mirindan esperantan poŝhorloĝon al via orelo, per kvazaŭ infana gesto, kaj aŭskultu la tik-takon de l' mondo marŝanta!

Por vi usonanoj, al kiuj ŝargitaj vaporŝipoj ĉiutage alportas amasojn da novaj kunvivantoj el ĉiuj nacioj de l' tero, ĉu ne admirindan okazon vi havas konatiĝi per Esperanto kun iliaj devenaj ĉirkaŭaĵoj? Manpremanate kun pola alveninto, ĉu ne kontenta kaj fiera vi sentos vin, ke per Esperanto vi legis en bonegaj tradukoj de Kabe, Kuhl aŭ Grabowski faman novelon de Prus, karajn legendojn de Njemojevski aŭ impresan dramon de Slovacki? Ĉu vi ne ĝojos, ke vi posedas hejme albumlibrojn pri Krakovo, pri Varsovio? Ke vi legas ĉiumonate en "Pola Esperantisto," ĉe la grupa biblioteko, originalajn artikolojn de konataj nuntempaj Poloj kiel satiristo Leo Belmont aŭ sciencisto Profesoro Bujvid? Ĉu tio ne helpas vin pli bone kompreni kaj ŝati tiun novan kunlandanon, ĉu tio ne igos vin iom pli "boninformita" kaj sekve pli alloga persono en konversacioj? Kiam vi legas en via ĉiutaga ĵurnalo iun pli-malpli klaran telegramon pri okazintaĵo en Albanio aŭ Kroatujo, kiam vi legas pri Rutena aŭ Bohema studenta manifestacio, ĉu ne plaĉas al vi ke per legado de esperantaj gazetoj aŭ libroj vi nun pli profunde konas pri la lingvaj kaj naciaj malfacilaĵoj en nia orienta Eŭropo anstataŭ rompi vian kapon aŭ tre pardoneble malpacientiĝi pri tiu senorda eŭropa lingvosalato kaj malluma politika miksaĵo. Same ĉu vi ne ĝojus sciante, ke per Esperanto ni eŭropanoj, lernas pri viaj admirindaj sociaj movadoj kaj organizaj geniaĵoj, ankaŭ pri viaj pensuloj kaj verkistoj, anstataŭ limigi nian scion je la kutimaj legendoj pri la "malvarmaj Yankees" aŭ la ĉieltuŝantaj domegoj.

Sajnas al mi, ke ni ĉiuj povas multe lerni per Esperanto, kaj tio estas utilega tuja uzo de la lingvo, kiu helpas ne nur nin mem, sed la tutan movadon. Efektive plej bona propagandilo estas por la publiko konstati, ke esperantistoj estas ĉiam bone informitaj homoj, ne nur pri aferoj de ceteraj landoj aparte, sed ankaŭ pri ĉiuj gravaj punktoj de tutmonda intereso. Samtempe se ni multnombre abonos la espe-



rantajn gazetojn kaj aĉetos la esperantajn librojn, kiuj povas doni al ni tian instruadon, ni tuj vidos kiel rapide pro tiu kuraĝigo, ili pli kaj pli perfektigos, kiel pleniĝos la mankoj kaj ordiĝos la dokumentaroj. Tre rimarkindan taskon laŭ la ĵus priparolita tendenco pleniĝas de kelkaj jaroj interalie S-ro Hodler per la fako "Nuntempaĵoj" en sia gazeto "Esperanto." Tiajn tre gratulindajn klopodojn ni devas multe pli profiti kaj nepre ĉerpi ĉion ĉerpeblan el nia esperanta havaĵo. Esperanto riĉigu nian penson, reciproke nia penso ĝin konstante pli riĉigos.

Tiel nia lingvo iom post iom donos al la moderna kulturo sian tutmondan esprimon kaj servos la penson de ĉiu homo.

Edmond Privat

## LA PERDITA HUNDO

**J**EN la anonco kiu okazigis la maltrankvilan aferon:—

"Perdita—Je la 10a, malgranda rathundo, kiu portis brazan kolringon, havante la pinton de sia vosto detranĉita. Estas nomita 'Jaĉjo.' Kvindolara rekompenco estos donita al iu ajn, kiu redonos lin al Johano Quill, N-o 84, Rakita Domlinio."

La suprecititan anoncon mi enpresigis en la ĉiutaga "Gazeto," esperante ke eble mi povos trovi la beston ŝatindan.

La "Gazeto" estas presita je la kvina horo matene. La sesan horon mia porda sonorilo min vekis, kaj tuj forlasinte la liton, mi malfermis la fenestron. Malsupren rigardante mi vidis viron kiu staras en mia antaŭkorto, kaj tenas miksnaskitan hundon, ligitan per ŝnurego. Rigardante min li diris: /

"Nu! Ĉu vi estas la viro, kiu perdis hundon?"

"Mi estas tiu viro," mallonge mi respondis.

"Mi havas vian hundon. Jen li staras."

Tiam mi komencis klarigi al tiu homaĉo, ke la mia estas malgranda rathundo, kaj sciigis lin, ke lia hundo pli similas pecon da arbo, sen duono de la ŝelo, kaj subtenata per kvar pecoj da ligno, ol ĝi similas ian hundon.

"Nu! Ĉu vi havos lin?" li demandis.

"Tute ne! Mi ne havus lin eĉ donace. Tuj foriru de mia florbedo, aŭ mi vokos la policanon."

"Nun! Vi kredas vin tre sprita. Ĉu ne? Mi ŝatus frapi al vi

la makzelon, se mi povus kapti vin! Vi ne rekonus bonan hundon eĉ se vi tian vidus.”

Tiam li foriris, rompinte du palisojn de la ĉirkaŭbarilo.

Post duonhoro, la sonorilo ree anoncis vizitanton ĉe mia pordo. Malsuprenirinte, mi malfermis la pordon, kaj vidis viron kiu havas ses diversajn koloritajn hundojn, kaj grandajn kaj malgrandajn, en mia antaŭkorto.

“K-kiu el l-l-la aro e-estas la v-via?” demandis la viro, balbutante tiel multe, ke mi tute timis ke li sufokiĝus pro eĉ la plej mallongaj vortoj.

“Neniu el tiuj estas la mia.”

“V-vi d-diris ke lia n-n-nomo estas ‘Jaĉjo,’ Ĉ-ĉu ne?”

“Mi nomis lin ‘Jaĉjo.’ ”

“Nu! V-vidu la hundojn,” kaj laŭte li kriis “Jaĉjo.”

Tuj la tuta aro ekrigardis lin, svingante la vostojn tre rapide.

“Tute sensenca! Ĉu vi supozas ke mi volas havi ses hundojn, ĉar oni nomis ilin ‘Jaĉjo?’ Mi ne deziras starigi kolbasbutikon. Ĉu vi komprenas? Elhaketajo ne apartenas al mia profesio.” mi diris kolere.

“Nu! Ĉ-ĉu vi-vi havos ilin?”

“Tute ne! Certe ne! Ne!! Ĉu vi supozas ke mi estas babilanta idiotulo?”

“Nun! V-vi ne p-povus havi l-l-l-lin eĉ se vi-vi bone p-pagus min. M-mi ne d-donus b-b-bonan hundon al v-viro t-tiel malsaĝa kiel v-vi estas. M-malsaĝulo vi-vi estas!”

Tiam li foriris, kaj la ses hundoj faris linion, trotante obeeme laŭ la strato, post la kolera viro.

Apenaŭ mi reiris en la domon, kiam ree mi aŭdis la pordsonorilon. Irinte pordon, mi vidis viron kiu havas malĝentilan aspekton, kaj tenas malbelan hundon. La ripoj de la hundo elstaris kvazaŭ li ĵus englutis spiralan risorton!

“Vi anoncis en la ‘Gazeto’ pri la perdo de via hundo, ĉu ne? Mi lin kaptis proksime de tie ĉi, en la strateto sed mi havis furiozan bataladon kaptante lin! Ja li estas bona hundo, sinjoro!”

“Nu! Bone mi scias, ke li ne estas la mia. Li havas treege malfortan aspekton, kaj estas tro etera por loĝi en ĉi tiu mondo, mi opinias.”

“Ne! Ne! Sinjoro, li nur estas perdinta siajn harojn, ĉiuj bonaj hundoj tion faras. Rigardu, sinjoro,” li diris, suprentenante la hundon per la kolpelto. “Vidu kiamaniere li bojegas, montrante grandan kuraĝon! Tiu hundo batalus je mil da sovaĝaj katoj, kaj sola venkus ilin!”

“Foriru!” mi subite kriis, kaj tuj la hundo ekmetis la voston inter siaj kruroj, kurante al mia pordego.

“Rigardu la agon, sinjoro, ĉu vi vidas?” ekscitite diris la viro, rekaptante lin. “Tio montras sendube ke li estas bonedukita hundo! Donu al mi la kvin dolarojn, sinjoro.”

“Certe mi ne donos ilin al vi, mi ne deziras havi tian hundaĉon, amiko mia.”

“Vi ne donos al mi la kvin dolarojn? Nu, havu lin por unu dolaro, sinjoro, sed ne diru al iu, ĉar vere li estas valora besto. Neniam ree vi havos tian bonan ŝancon!”

“Mi diris al vi, ke mi ne havos lin.”

“Nu! Ne havu lin, estas malgrave al mi, li ne estas la mia.” Kaj li piedfrape forĵetis la maldikan hundon tra miaj floroj, rompante kelkajn el miaj florpotoj, dum la hundaĉo rapide kuris laŭ la strato.

Tuj ekaperis granda maldelikatulo, portanta malbelan ĉapelon. Li venis al mia pordo kun granda dogo, kiu havis kurbajn krurojn kaj la voston tute detranĉitan. Kiam la mastro vokis lin, la tuta lasta parto svingiĝis, anstataŭ la vosto.

“Mi havas vian perditan hundon, sinjoro,” diris la malbela homo, “Kaj nun mi ŝatus havi la monon promesitan.”

“Amiko, tiu ne estas mia hundo.”

“Tute jes, sinjoro, sendube li estas la via.”

“Sed mi rediras, ke li ne estas la mia!”

“Mi estas certa, sinjoro, ke tie staras via hundo. Vi diris ke al li mankas la fino de la vosto? Nu! Rigardu la voston!”

“Nu! Certe mi ne havos lin!” pli kolere mi diris.

“Vi deziras trompi min, ĉu ne. Mi repagos vin,” li kolerege respondis, kaj li mallaŭte vokis al la besto. “Mordu lin Jaĉjo.” Tuj la dogo sin ĵetis al mi, kaj apenaŭ mi havis sufiĉan tempon por kuri en la domon.

Mi ekfermis la pordon je la granda nazo, kaj mi preskaŭ forpremis la antaŭan parton de tiu malbela besto, antaŭ ol mi liberigis lin.

La viro senĉese malbenis min, dum kvin minutoj, tiam, ĵetinte brikon kontraŭ mian pordon, li foriris. Post dudek minutoj, iu ree sonorigis la pordsonorilon. Irinte pordon, mi vidis malgrandan variolmarkitan viron kiu portis ruĝan ĉemizon. Li tenis tre makulitan hundon, kiu aspektis kvazaŭ li estis en pluvo da inko, nehavante ombrelon.

La markita viro diris, “Sinjoro, vi ne forgesas la anoncon presitan en la ‘Gazeto’ pri tiu perdita hundo, ĉu vi? Nu, mi havas lin.”

“Ho! Mi! Bone vi scias ke tiu aĵaĉo ne estas mia perdita hundo.”

“Via nomo estas Quill. Ĉu ne?”

“Tio estas la nomo,” mallonge mi respondis.

“Jes! Kaj tiu ĉi estas la hundo. Li estas la plej bona ratkaptisto kiun vi iam aŭ ie vidos! Li ĵetas la ratojn ĉirkaŭ si kvazaŭ li sin amuzas, kaj li ĉiam . . . . .”

“Eble tio estas vera, sed li ne estas mia hundo.”

“Ankaŭ, li estas tre bona gardema hundo. Nun rigardu lin! Vidu! Eĉ nun li staras gardante! Li ĉiam estas maldormema, li gardos vin tage kaj nokte,” li babilis rapide. “Mi ligos lin per ĉeno, dume havigu por mi, la kvin dolarojn.”

“Ne! Ne! Mi ne bezonas la hundon. Mi sencerbigos lin per pafilo, se vi ne forprenos lin!”

“Nu! Haltu, nekonatulo, hodiaŭ mi havas malmulte da mono, prunte donu al mi, kvin dolarojn, kaj mi postlasos la hundon kun vi por esti garantiaĵo, mi repagos vin morgaŭ,” diris la persista viro.

“Mi diras al vi, foriru tuj, aŭ mi deŝiros al vi la haŭton!”

“Ho! Vi estas tute malŝatinda viro, vere vi estas. Ve ne donus al malriĉa viro, eĉ unu cendon!” kaj tiam la variolmarkita viro foriris, rompinte unu el la palisoj de mia ĉirkaŭbarilo per kiu li frapis al la hundo la kapon.

La sekvantan minuton ekaperis viro alkondukanta grandan kort-hundon, tiel grandan kiel juna ĉevalo.

Sen antaŭparolo, la viro komencis, “Mi diras, sinjoro, nun mi devas havi la kvin dolarojn por la perdita hundo. Mi ja bezonas la monon!”

“Nu! Vi certe ne havos ilin, kaj plie, se vi ne tuj foriros, mi vokos la policanon!” kolerege mi respondis.

Tuj li diris al la hundego, “Kaptu lin, Zipo!” kaj la hundo ek-saltinte al mi, mordis pecon da muskolo el mia kruro, kaj multe mal-beligis mian nazon.

Tiam la krimulo alvokis sian hundon for de mi, kaj malafable ridante, foriris.

Al la sonorilo mi ne respondis dum la tuta tago, sed je la kvara horo posttagmeze, trarigardante tra la fenestro, mi ekvidis mian korton plenigitan de viroj havantaj hundegojn kaj hundetojn el ĉiu speco trovebla ie sur la tero.

Estis nigraj hundoj, blankaj hundoj; hundoj flavaj kaj multkoloraj; pulopikitaj hundoj; hundoj kiuj havis vostojn, ankaŭ hundoj senvostaj. Estis rathundoj, dogidoj, pudeloj, vulphundoj. Novlandhundoj kaj hundoj miksnaskitaj; halthundoj, perdrikhundoj kaj multaj aliaj sennomaj kaj diversaj koloritaj, ĉiuj murmuregantaj, kriantaj, ĉirkaŭe saltantaj en mia korto, kaj jam neniom da floroj restis nedifektitaj. La bruego similis sovaĝbestojn dum la manĝa horo. Ĝis nun

mi ne trovis la perditan hundon, kaj tute mi ne deziras iam trovi lin! Mi ne volas eĉ vidi ian hundon antaŭ ol mi eniros la silentan tombon, mi havas sufiĉan!

Sed multe mi ŝatus vidi ĉiujn hundojn de la mondo kolektiĝintaj ĉe unu sama loko, kaj la viro havanta tiun korthundon, en la mezo de la bojanta, murmureganta aro, senĉese turmentegata ĝis frenezigo! Tio estas ĉio kion nun mi deziras rilate al ia hundo, en la nuna vivo! Bone mi scias ke jam mi havas sufiĉan!

El la angla tradukis,  
William F. Salt.

---

## NELLA

aŭ

### La Vojo Nekonata

Originala Novelo de Edmond Privat

#### Ĉapitro VII

El kormordantaj solecaj pripensadoj eltiris Nellan la neceseco de l' ĉiutaga vivo. Al sia pangajnado ŝi devis reiri. Iom da varmo revenis en ŝian koron per la penso, ke ŝi baldaŭ retrovos siajn karajn lernantinojn, ke ŝi sin donos tutan al ili kaj pli ol iam antaŭe fervore klopodos por altigi ilian komprenon kaj idealon. De tempo al tempo tamen nigran nubon blovis sur tiu revarmiga flamo la dubo, la timinda dubo, ĉu la lernantinoj ŝin amos same, ĉu ne forflugis jam la influo kun la estinta beleco? Tiuj, kiuj ŝin amis kaj konis ja restos eble fidelaj. Sed la novaj? La ĉiujare alvenanta bandeto de petolemaj, kritikemaj knabinoj, por kiu tiom valoras la ekstera aspekto. Kiel influi ilin pri arto, kiam estos jam nevenkebla ilia tuja malfido, eble eĉ ilia naŭzo?

Kiam Nella vizitis la direktorinon de la lernejo por ŝin informi, ke ŝi nun resaniĝis kaj por diskuti la aranĝojn por la aŭtunaj kursoj, ŝi naive kaj sincere malfermis sian koron al tiu lerta kaj afabla virino. Ŝi konfesis al ŝi siajn dubojn esperante moralan helpon, atendante certigon, ke ŝi trograndigas, ke ŝi ne devas ion similan timi, ke ŝian laboron ne povas atingi tia cirkonstanco. Ja multaj homoj emas detruigi sian timon per alia homo kaj, en tiaspecaj konfesoj, kiom ofte ili plej nigre pentras la bildon por ebligi la aŭskultanton ilin tiom pli konvinke trankviligi kaj tiom pli forte rekuraĝigi.

Al la estrino kompreneble tre plaĉis tiel neatendita faciligo de ŝia malagrabra tasko. Ŝi ja sciis pri la vizaĝkripligo de Nella kaj post deca tempo de simpatio kaj kompatio jam decidis, ke tute neeble estus ŝin konservi kiel instruanton. Antaŭe ŝia granda ĉarmo estis bonega allogilo. Multaj gepatroj rakontis al la estrino kiel la filinoj ŝatis la lecionojn de F-ino Passor k.t.p. Ŝia salajro estis pli ol duoble repagita per la sukceso de ŝia kurso. Nun ŝia bedaŭrinda aspekto povus esti kaŭzo de ĝeno aŭ malplaĉo. Ĝi povus ankaŭ krei impreson ĉagrenan, malĝojigan, kaj suferigi la bonkorajn knabinojn. Zorge la estrino volis eviti ion similan en la lernejo. Nur plaĉo, plezurigaj impresoj povus konservi kaj grandigi la riĉan klientaron. Ne por suferi aŭ kompati aŭ pripensi malagrablajn aferojn de l' vivo venas la fraŭlinoj, sed por . . . por lerni sendube, sed por lerni ĝoje, por havi plezuron, por pasigi agrablajn horojn kaj ŝati la lernejon.

La estrino ja tre dezirus konservi Nellan se estus eble, sed ŝi ja tre klare antaŭvidis malfacilaĵojn kun la patrinoj, ĝenantajn situaciojn. La ĉeesto de Nella en la lernejo estus ĉiama ombro en la domo.

Kompatio estas bela, sed antaŭ ĉio estas la vivgajno, la mona sukceso; do la estrino jam de longe decidis ne konservi Nellan, sed kiel ŝi faros por ŝin fordanki, jen la malfacila demando. Tial granda —eĉ surpriza—helpo estis la konfeso de la sincera junulino. La estrino ne povis ne profiti tiel bonegan okazon.

“Kiel bone mi vin komprenas, kara amikino mia,” ŝi diris “kaj kiel neordinare klarvida persono vi estas. Mi ja tre ofte jam miris kiel vi povus venki la malfacilaĵojn. Neniam mi suspektis, ke vi povus ĉion tiel klare antaŭvidi. Ho, vi certe multe trograndigis, sen ia dubo. La lernantinoj vin amegas. Kiu koro povus ja kontraŭstari je vi? Sed mi tre bone komprenas vian penson kaj vian deziron ne daŭrigi la instruadon.”

Nella provis tiam ŝin interrompi ĝentile, sed la estrino ne haltis. Dolĉe kaj rapidflue ŝi parolis.

“Estos por ni vera funebro en la lernejo, kara fraŭlino, vera funebro vin adiaŭi. Mi ne scias kiel diri al vi mian bedaŭron kaj samtempe mi volus trovi indan manieron montri al vi mian grandan dankemon pro via—ho ve—tro mallonga kunlaboro.”

Nella jam tre klare komprenis nun la intencon de l' estrino. Ŝi ne provis plu paroli. Tiu plia elreviĝo ŝin silente glaciigis sur la seĝo. Ŝi sentis ke se ŝi nenion diros, ŝi estas nepre nun fordankita kaj ĵetita al mizera senlaboreco. Por savi sian pangajnilon ŝi devus ion diri, klarigi, ke ŝi ne firme decidis ĉesi sian instruadon, ke ŝi nur bezonis kuraĝigon. Sed nenia vorto sukcesis trapasi ŝian gorgon. Ĉu fiereco, ĉu indigno, ĉu malespero, ia malvarmiga potenco kunŝosis

ŝiajn lipojn kaj ŝi sin lasis esti venkata de tiu lerta virino. Nun estos por ĉiam tro malfrue.

La estrino daŭrigis sian dolĉtonan alparolon, ŝi proponis al Nella pagi al ŝi la kutiman salajron ĝis Kristnasko por ŝin helpi. Sed Nella rifuzis kaj kiel eble plej baldaŭ sukcesis fini tiun dolorigan viziton.

Nenia humiligo estis al ŝi ŝparita kaj eĉ adiaŭan kison ŝi devis elporti.

(Daŭrigota)

### “MI REKOMPENCOS”

—Rom. 12, xix.

Originala novelo de John L. Stanyan  
(Speciale verkita por Amerika Esperantisto)

“Oni nomas min feliĉa—  
Mi pro tio ridas,  
Ĉar kaŝitan mian ploron  
Ili ja ne vidas.

Malfeliĉa de naskiĝo  
Restos mi ĝis la morto;  
Kial naskis vi, patrino  
Min por tia sorto?”  
—Trad. A. Grabowski.

### Ĉapitro II

La sekvantan matenon Sinjorino Dekster kaj Georgo staris ĉe la pordego antaŭ la domo. Kiel patrino ŝi konsilis al la knabo ke li estu bonmora kaj diligenta; ke li ofte legu la Biblion, ĉiutage preĝu, kaj ke li skribu al ŝi almenaŭ unu fojon en ĉiu semajno, tiel ke ŝi povos scii pri kiamaniere li sukcesas. Ĝuste kiam ŝi adiaŭis lin ŝi ŝtelglitis malgrandan monujon en lian manon, dirante, ke ne estas multe da mono en ĝi, ĉar ŝia edzo estis forpreninta for de ŝia kasoskatoletto ĉiom da mono kiun ŝi posedis.

“Adiaŭ, kara onklino,” kun tremantaj lipoj diris Georgo.

“Adiaŭ, knabo mia; adiaŭ. La bona Dio benadu vin. Havu kuraĝon, kaj ĉio okazos bone por vi. Adiaŭ.”

Marŝinte multajn mejlojn, je la vesperiĝo tre laca li atingis urbeton. Tie li dormis en fojnejo. Li songis pri Mario; pri feliĉeco kaj amo en sia iam estonta propra hejmo. Post kvar tagoj li eniris la grandan urbon, pri kiu li tiel ofte estis leginta kaj aŭdinta tiel multe. Li sidiĝis en bela parko por iomete ripozi, kaj ankaŭ por kolekti siajn pensojn. Li kalkulis sian monon kaj eksciis ke la monsumo ne longe sufiĉos, kaj tuj venis en lian kapon la ideo, ke li devus komenci labo-

ron kiel eble plej baldaŭ. Li luprenis malgrandan, subtegmentan ĉambron, kaj enlitiĝis je frua horo.

La morgaŭan tagiĝon li foriris por serĉi ian deĵoron. En la posttagmezo oni dungis lin kiel helpanton en ĉevalejo. Kelkaj semajnoj forpasis, kaj Georgo iom post iom alkutimiĝis je la nova vivmaniero. La publika biblioteko estas apude, kaj li pasigis la vesperojn per legado kaj studado. Li havis talenton priliteraturan, kaj li ĉiuvespere skribis siajn pripensaĵojn—li eĉ verkis kelkajn poemojn.

Iun tagon en la strato li ekrimarkis maljunulinon, kiu portas lambastonojn, kaj estis transironta la straton plenan de diversspecaj veturiloj. Verŝajne neniu krom li mem ekvidis la virinon, kaj ke estus tre dangere al ŝi sole transiri. Tial li rapidis al ŝi demetante la ĉapelon.

“Pardonon, sinjorino; permesu ke mi helpu vin.”

Sen iu vorto la virino sin apogis sur la brako de Georgo, kaj baldaŭ ŝi estas ĉe la alia flanko de l' strato. Ree demetante sian ĉapelon li estis forironta.

“Haltu, mia filo; haltu momenton,” dolĉvoĉe aldiris ŝi. “Mi vin dankas pro via helpo. Certe via patrino devas esti tre fiera pri tia filo. Mi ne havas monon por doni al vi, sed tutkore mi benas vin. Ĉiam estu aminda kaj kompatema al aliaj, kaj la bona Dio rekompencos vin sufiĉege. Dio benu vin.”

Post kelka tempo Georgo trovis laboron en ĵurnala oficejo, kie lia scio pri literaturaĵoj post nelonge valoriĝis al li. La redaktoro baldaŭ sciigis, ke la freŝdata dungito estas poeto same kiel li estas bona prozoverkisto, kaj multe da liaj skribaĵoj estis presigataj de tempo al tempo.

Forpasis unu jaro. Iun tagon Georgo ricevis leteron kiu havis neordinaran aspekton ekstere, kaj sur kies koverto troviĝis belega monogramo. Leginte la leteron li eksciis, ke ĝi estis skribita de tre riĉa societa virino, pri kiu li kelkfoje legis en la societa fako de la ĵurnalo. La letero petis ke li faru viziton ĉe la skribinto la sekvantan antaŭtagmezon. Supozante ke la farota vizito rilatos al ia afero apartenanta al la ĵurnala oficejo, li iris al la nomita domo je la difinita horo.

La domservisto kondukis Georgo'n en lukse meblitan gasteĉambron, sciigante lin, ke la dommastrino aperos post nemultaj minutoj. Ne estis necese ke li longtempe atendu. Je lia surprizo eniris la ĉambron la sama maljunulino, kiun li helpis transiri la straton antaŭ unu jaro. Ŝajnis al li, ŝi estas pli kripla ol en la antaŭa okazo. Ŝi portis en la mano oreltrumpeton, kiun ŝi devige uzis. Ŝi diris al Georgo, ke ŝi neniam estis forgesinta pri lia afableco kaj helpo en tiu



tago antaŭ unu jaro, kaj ke nur lastatempe ŝi sukcesis sciigi pri lia nomo kaj loĝejo. Ŝi ne havas parencojn, kaj konscias, ke ŝi ne pli longe vivos, kaj tial ŝi volas aranĝi siajn aferojn tiamaniere, ke iu inda persono havos ŝiajn posedaĵojn. Ŝi scias pri neniu persono pli inda ol li, al kiu ŝi volas doni ilin.

Georgo apenaŭ komprenis la signifon de ŝiaj vortoj. Li certigis al la parolinto, ke tio, kion li faris por ŝi estis nur la devo al tiuj, kiuj estis pli aĝaj ol li mem. Ŝi sonigis sonorileton kaj baldaŭ aperis viro, kies aspekto klare montris ke li estas leĝisto. Li demetis el sia poŝo kelkajn paperojn sur kiuj estis skribita la testamento de la maljunulino. Per ĝi ŝi testamentis al Georgo Kenriĝ ĉiom da siaj posedaĵoj, kaj centmil spesmiloj estis tuj transdonataj al li. Ŝajnis al li ke li songas, kaj ke li subite vekigis.

Post la foriro de la leĝisto la virino petis al Georgo, ke li rakontu al ŝi pri sia pasinta vivo. Tion li volonte faris, ne forgesante preparoli pri sia amo al Mario. Pli ol unu fojon li ekvidis larmojn en la okuloj de sia aŭskultanto, sed ĉu estas pri ŝia simpatio, ĉu estas pro iu afero ama en ŝia propra juneco, li neniam sciis.

Ĉe la finiĝo de lia rakonto, ŝi insistis ke li tuj pretigu fari viziton al la Dekstera domo, veturante per kvarĉevala veturilo tute inda je lia nuna pozicio en la mondo. Tial, post unu semajno li estis survoje, en sia propra veturilo tirata de belaj ĉevaloj. Sur la antaŭsidloko sidis veturigisto. Pro diversaj kialoj, Georgo konkludis, ke estus pli bone ne prezenti sin antaŭ la Dekstera domo kun tia atesto je sia riĉeco, tial li prefere restigos la veturilon ĉe la gastejo en la apuda urbeto, kaj piediros la ceteron de l' vojo. Alveninte al la hotelo, li anstataŭigis sian vestaron per pli nebonaj vestoj.

Ekvesperiĝis kiam li atingis la angulon de la vojo ĉe kiu klare vidiĝis la domo Dekstera.

---

### Ĉapitro III

“Mi demandas al mi kiu estas tiu, kiu venas tien ĉi?” diris Sinjoro Dekster, dum li rigardas tra la fenestro. “Kiu ajn li estas konduku lin en la gasteĉambron, kaj demandu kia estas lia afero je mi.”

La servisto rapidis al la pordo, kaj tuj revenis.

“Estas Georgo!” li diris.

“Mia malbenita nevo?” bojis Sinjoro Dekster.

“Mia kara nevo!” ĝoje kriis Sinjorino Dekster, ŝia vizaĝo heliĝinte pro feliĉeco, dum ŝi flanken ĵetis sian brodaĵon.

“Georgo!” denove bojis Sinjoro Dekster. “Kompreneble tiel malriĉa kiel preĝejrato, kaj li venas tien ĉi por pruntepreni monon. Iru al li, kaj diru, ke mi estas malsana kaj ne povos renkonti lin.”

Ĝuste kiam la onklo diris tiujn vortojn, Georgo eniris la ĉambron, kaj klare aŭdis ilin. Li estis forlasonta la ĉambron kiam lia onklino kuris al li kaj ĉirkaŭbrakis lin, kovrante liajn vangojn per kisoj.

“Mia filo,” ŝi diris, “mi estas tiel ĝoja vin denove vidi! Kiel vi estas kreskinta! Sidiĝu, kaj parolu al mi pri vi. Ĉu vi povos resti kun ni dum iom da tempo?”

“Nur mallongan tempon, onklino,” respondis Georgo, okulumante Sinjoron Dekster. “Nur sufiĉe da tempo por sciigi kiel vi ĉiuj fartas, kaj ankaŭ por sciigi al vi iom pri tio, kio okazis al mi de post mi foriris de tie ĉi.”

“Sidiĝu!” malvarme diris Sinjoro Dekster.

“Nu, Georgo, kiel vi progresas?” aminde petis la onklino.

“Ho, mi laboras, sed bedaŭrinde mi ne bone sukcesas,” estis la respondo.

“Ĝuste tio, kion mi pensis,” diris al si Sinjoro Dekster. “Li estas alveninta por ke li povu peti monsumon; sed, neniom li ricevos de mi.”

Georgo ĉirkaŭen rigardis la ĉambron, kvazaŭ li atendas iun. Post ne longe li demandis, “Kie estas Franko?”

“Li ĉasas kiel kutime. Li hejmenrevenos dum la vespero.”

“Vi devus vidi kia bela junulo li estas,” aldonis Sinjoro Dekster, lia vizaĝo pli kaj pli ruĝiganta pro fiereco. “Ne tiel pala kaj maldika kiel vi, sed male—li estas bildo de saneco.”

“Franko ja estas pli bonŝanca ol mi,” estis la plendema respondo. Nekontentiga silento sekvis tiun diradon. Post nelonge Georgo rekuraĝigis. “Kaj—kiel fartas Mario?”

Sur la frunto de Sinjoro Dekster aperis sulketoj; li kuntiris la brovojn, sed nenion eldiris.

Tute aminde Sinjorino Dekster diris, “Mario ĉeestas naskiĝotagan feston hodiaŭ. Morgaŭ vi vidos ŝin. Ho, kiel frape ŝi aliĝis de kiam vi ŝin lastafoje vidis. Nenia signo de kamparuleco. Ŝi estas estinta en fraŭlina lernejo. Ŝi estas bona fortepiana ludisto—kaj, ŝi povas flue paroli la francan lingvon.”

“Kaj, en la frua estonteco ŝi edziniĝos,” interrompis Sinjoro Dekster, kun forta akcento sur la vorto “edziniĝos.”

La vizaĝo de Georgo ruĝiĝis, kaj lia ĉapelo falis plankon. Sinjorino Dekster diris ion pri la neentuziasmo de Mario koncerne la okazontan edziĝon.

“Pro kio ŝi ne estas pli entuziasma pri la edziĝo?” petole demandis Sinjoro Dekster.

“Mi scias la kialon,” mallaŭte sonas la respondo de la patrino de Mario.

La trio pasigis la vesperon laŭvole; Sinjoro Dekster pipfumis kaj legis, dum lia edzino gastumis sian nevon. Ĉirkaŭ la naŭa oni aŭdis bruadon ekster la domo.

“Jen estas Franko,” ekdiris la patrino. Sinjoro Dekster metis la libron sur la tablon, kaj ordonis ke oni pretigu varmajn manĝaĵojn por la junulo.

Kiam Franko eniĝis la ĉambron, li manprenis la patron, parolante dolĉe al la patrino, apenaŭ nevidante la kuzon.

“Tiu ĉi estas Georgo,” alparolis la patrino al Franko.

“Estas tute egale al mi, kiu tiu estas,” malamike diris Franko.

Georgo residiĝis. “Mario, karulo mia,” li diris al si mem, “se vi ne estus tie ĉi, mi neniam enmetus piedon en tiun ĉi domon; sed mi toleros ion—eĉ tiun ĉi insulton—pro mia amo al vi.”

Franko sternis sin sur divano. “Hodiaŭ mi ne havis sukceson.”

“Vi devas havigi pli bonajn hundojn,” respondis la amegema patro. “Vendu tiujn, kiujn vi nun havas, kaj aĉetu pli bonajn.”

“Nu, patro, mi scias kie estas pli ol ordinare bona hundo, kiun mi povas aĉeti je du cent spesmiloj; kaj se vi donos al mi tiun monsumon, mi morgaŭ acetos ĝin.”

“La monsumon vi certe havos morgaŭ matene.”

Tute indifere, Franko sin turnis al Georgo, kaj iomete sarkasme demandis, “Kiel vi sukcesas en la urbo?”

“Bone, mi vin dankas,” ĝentile respondis Georgo.

“Kio estas la kialo, ke vi estas tiel pala? Ĉu vi estas malsanema?”

“Ne. Mi ĉiam havas palan aspekton.”

“Ĉu vi iam ĉasas?”

“Neniam.”

“Vi ne ĉasas? Kion vi faras por plezuro?”

“Mi laboradas kaj studadas.”

“La ĉasado estas la nura laboro kiun mi havas,” diris Franko, “Ĉu vi akompanos min morgaŭ?”

“Mi ne scias; eble.”

“Estus nebona se Georgo akompanus vin,” interrompis Sinjoro Dekster. “Li estas malfortika, kaj la ĉasado eble malsanigus lin.”

“Ha, patro, nenio nebona okazos al li,” diris Franko kun rideto. “Nu, Georgo, kio estas la novaĵo en la urbo? Rakontu ion al mi—ion ŝercan kaj ridigindan.”

“Mi tre bedaŭras, ke mi ne povas rakonti al vi ion amuzigan.”

Oni anoncis, ke la vespermanĝo estas pretigita, kaj ĉiuj sidiĝis ĉirkaŭ la tablo.

Siaflanke Franko daŭrigis la konversacion.

“Ĉu vi jam vidis Marion? Tre bela junulino. Bedaŭrinde estas, ke ŝi estas mia fratino. Mi pripensu! Ĉu vi ne iam enamiĝis kun ŝi?” kaj la parolinto ridetis.

La okuloj de Georgo preskaŭ fermiĝis, lia frunto sulkiĝis.

“Ĉu tio ne estas la fakto?” insulteme daŭrigis Franko.

“Nur kiel frato kun fratino,” mallaŭta estis la respondo.

“Ho; nur kiel frato kun fratino!”

Georgo mordetis sian lipon ĝis la sango preskaŭ elfluis, tiel forta estis lia peno daŭrigi sian sinregadon.

“Nu! Atendu ĝis kiam vi ŝin vidis,” aldonis Franko. “Vi certe malbenos vian sorton pro tio, ke vi estas tiel mizere malriĉa. Sendube ŝi jam forĝesis la malsaĝecon de sia juneco, kiam ŝi efektive opiniis, ke vi estas iu. Kion vi nun faras en la urbo? Kredeble vi estas ia servisto.”

Ne plu povis Georgo sin reteni. Li salte leviĝis.

“Sinjoro, mi estas nek malriĉa nek servisto. Mi estas riĉa. Pli riĉa ol vi aŭ via patro, kaj mi nenion petas de iu ajn persono.”

“Riĉa? Vi do estas riĉa, kaj bezonas nenion de ni?” diris Sinjoro Dekster.

“Jes, mi estas riĉa, kaj petas nenion de vi, escepte ordinaran ĝentilecon.”

Sinjoro Dekster apenaŭ ne povis kredi tion, kion Georgo ĵus diris. Georgo riĉa? Neeble!

Ĝis malfrua horo Georgo priparolis tion, kio okazis al li depost li eniris la urbon.

(Daŭrigota)

---

Unu homo aĉetadis ĉiutage ses panojn. Najbaro demandis al li, kion li faras el ses panoj. Li respondis: “Unu mi konservas, unu mi forĵetas, du mi redonas, du mi alpruntas.” Diris la alia: “Tiun ĉi enigmon mi ne komprenas. Klarigu ĝin.” Respondis la unua: “La pano, kiun mi konservas, signifas, ke mi ĝin manĝas. Unu panon manĝas la bopatrino: tion mi kvazaŭ forĵetas. Sub la panoj, kiujn mi redonas, mi komprenas, ke manĝas ilin la gepatroj. La du panojn, kiujn manĝas la filoj, mi donas prunte.”

El hinda lingvo tradukis H. M. S.

### PRI SKLAVOJ KAJ RAJTOJ

---

Estas neniam rajtoj pri kiuj oni universale konsentas. Sole establitaj rajtoj ricevas atenton. Oni ridas kaj mokas je ĉiuj aliaj rajtoj, kiuj estas postulataj. Tio estas historia fakto.

Ni apartenas al raso kies instinkto estas sklavigi. Ekzistas nur du klasoj,—sklavoj kaj mastroj. Sklavoj havas neniamajn rajtojn, kaj kontente restas sklavigitaj. Jen la mistera fenomeno de estaĵo edukita en homa sklaveco, jen la sento ke oni ne posedas valoron. Sklavoj supozas ke ili havas neniamajn rajtojn, kaj estas instruitaj opinii sin senvaloraj. Sed historio estas plena je ekzemploj en kiuj “la vermo turniĝas” kaj per tio multege indignigas tiujn personojn, kiuj surpaŝadis sur li.

Oni batalis por rajtoj en Eŭropo en la 19a jarcento; la superaĵ klasoj ne volis permesi ke la mezaj klasoj partoprenu en iliaj rajtoj; poste oni ne volis permesi ke la malriĉaj klasoj tiel partoprenu. Sed okazis senĉesa vekigado.

Sammaniere la virinoj estas firme tenitaj de malnovaj supozoj, kaj senigitaj je rajtoj; sed ili ankaŭ vekigadas. Malfacile estas kredi ke eĉ en Bostono troviĝas virinoj ankoraŭ tiel firme tenitaj de malnovaj supozoj ke ili avide neas sian taŭgecon por partopreni en civitana respondeco, kaj sian deziron tion fari,—tute kontentaj, kiel estis la sklavoj en Romo.

Rajto, kiu estas rajto por unu persono, sed ne por alia, estas nekomprenebla. Ne ekzistas demando pri oportuneco koncerne rajto. Ne estas logike diri ke teorie vi kredas ke virinoj devus havi rajtojn, sed ke vi ne opinias ke estas praktike ke la virinoj ilin havu.

El parolado de Basil King tradukis

Obser Vanto.

---

### A LETTER RECEIVED

---

Sta. Ludoviko, Mo.

S-ro Sekretario de Amerika Esperantisto.

Honorinda sinjoro: Mi danke vidas en la lasta numero de **Amerika Esperantisto**, ke vi laŭdas kiel gravan aferon, por la movado de la lingvo Esperanto, ke ĝi estas enmetita en mia Kolegio kiel regula lingva studado. Jes, mi tion faris; unue, konvinkita pri la vortoj de

la Superega Paŝtando de la Katolika Eklezio, la Papo Pio X, kiu diris al frato Isidoro, "Esperanto vere havas grandan estonton"; due, tial ke mi vidas, ke ĉiuj nacioj de la malnova kaj de la nova mondo klopodas por disvastigi ĝin; trie, ĉar multaj registaroj jam aprobis ĝin, kaj neniuj estro el la civilizitaj nacioj malaprobis ĝin; kvare, ĉar la katolikoj jam havis kvar katolikajn internaciajn kongresojn por katolikaj aferoj kun la aprobo kaj beno de la Papo; kvine, pro tio ke ĝi estas necesajo por la ĉiutagaj interrilatoj de la komercaj nacioj; sese, ĉar, ĝi estas la plej facila kaj logika el ĉiuj lingvoj; sepe, tial ke mi ricevis oftajn demandojn esperante pri la Katalogo de la Kolegio ktp. ktp. Kaj mi opinias, ke se la mondo akceptus la internacian lingvon, ĝi certe progresadus pli rapide por la bono de la homaro.

Mi ankaŭ ne devas kaŝi, ke mi envicigis Esperanton en la regulan studadon de la Kolegio, tial ke mia karega amiko la hispana Pastro Mariano Mojado, estas unu el la plej entuziasmaj esperantistoj, kiu neniam laciĝas instruante Esperanton. Li ĉiutage instruas en la Kolegio.

Vin dankante pro via afableco pri mia Kolegio, kaj vin rajtigante por uzi tiun ĉi leteron laŭvole por la disvastigo de Esperanto, mi restas respektplene via,

La Kolegiestro,

---



---

## WORLD-PEACE AND A WORLD LANGUAGE

---

"The Relation of Esperanto to International Peace" was the topic discussed by a number of prominent Boston Esperantists with Dr. James L. Tryon, of the Massachusetts Peace Society, at a recent meeting in the rooms of the society in Boston. The Esperantists made the following statement as to the progress of their language and its value as an adjunct to the movement for world peace:—

Among the actual accomplishments of Esperanto, as a neutral medium of communication between the nations and a means of drawing widely differing people into closer sympathy and understanding, is the significant fact that when Oxford University recently desired to communicate with other institutions of learning throughout the world, it sent out a tri-lingual message printed in English, Latin and Esperanto.

For nine consecutive years international conventions have been

held, conducted wholly in Esperanto, many nations sending delegates: at Boulogne-sur-Mer in 1905; at Geneva in 1906; at Cambridge, England, in 1907; at Dresden in 1908; at Barcelona in 1909; at Washington, D. C., in 1910; at Antwerp in 1911; at Cracow in 1912; at Berne in 1913. The 1914 convention will be held in Paris, and the gathering in 1915, in Edinburgh.

At these conventions Protestants, Catholics, and Hebrews have met for religious worship, using a common language; debates have been conducted and dramatic entertainments have been presented which the audiences, composed of men and women of many nationalities, have followed in Esperanto with ease and without translation.

The beginnings of a large literature have been made in Esperanto. The New Testament has been published and the Old Testament is in process of translation. Classics from many lands have been rendered into Esperanto, thus becoming available, often for the first time, to students of the language. For twenty-five years a world-wide correspondence has been carried on in this tongue by people totally ignorant of each other's native speech.

Within two years three well-known Esperantists—Alfred Fried, of Austria, Henry Lafontaine, of Belgium, and Charles Richet, of France—have been awarded Nobel Prizes, the two first-named receiving the Peace Prize.

In view of these facts it was contended that the growing Peace Movement fairly involves unity of language so far as such unity is needful for international communication. Hitherto the Peace Movement has made progress by the force of its appeal to the intellect. May we not raise the question whether the movement has not somewhat neglected those appeals to the heart that are the soul of brotherhood?—appeals which the Esperanto movement makes and fosters.

In all international gatherings and conferences the necessity of translation into the leading languages of the world is a cumbersome method of exchanging ideas, not to mention the fact that, owing to peculiarities of national idiom, translation rarely if ever translates. Should not all friends of peace and unity be favorably disposed to Esperanto which enables all nationalities to express themselves with precision directly and without the need of translation?

The large literature in Esperanto, its unbroken series of world-conventions, the demonstration of its ability to meet the requirement of a neutral, international language, the existence of a language committee, formed on the plan of the Academie Francaise, which ensures the orderly development of the language—these things prove its permanency and efficiency.

Should not Pacifists recognize the value of Esperanto as an aid to their efforts to extend human brotherhood? Would not both movements be strengthened if the Peace Movement favored Esperanto and used it when necessary, and the Esperantists of the world in turn identified themselves with the Peace Movement? Boston Esperantists believe that Esperanto can be made a mighty instrument in the hands of the friends of peace, and they urge its increased use for the promotion of international amity and understanding.

Further, Peace Societies would do a valuable work in bringing about mutual understanding in the world, if, in their several lands, they would urge the teaching of Esperanto prior to that of any other non-national language, in their various schools.

Jas. L. Tryon, Ph. D.,  
Sec. Mass. Peace Society.

---

### WORLD GLEANINGS

---

AUSTRIA. The 17 Esperanto groups in Wien recently convened in the great concert hall of the city in honor of the birthday of Zamenhof. After a banquet and music, speeches were made by many out-of-town delegates, who were sent as representatives of various groups. Among the speakers and guests of honor were Dr. Giesswein, Dr. Lorand, "Nobelpremiito" Fried, and the Princess Kopassis, widow of the late Esperantist Prince of Samos.

CUBA. Dr. Antonio A. Ruiz, the guiding spirit of "la afero" in Cuba, has just received the title and honors of a knight of the Committee of the Red Cross. Dr. Ruiz works unceasingly for the Esperanto movement, and has succeeded in placing the language in a high position among the Red Cross affairs. He has, in addition, just received the appointment by the Cuban president, as a delegate to the Labor Convention in New York. Esperantists in that city will no doubt have an opportunity of meeting this interesting samideano.

HUNGARY. The Hungarian Minister of Education has permitted Esperanto as a subject in the curriculum of the Royal Hungarian Commercial University of Budapest.

After the occasion of the ridiculous statement of the Police Chief of Szekesfehervar, as already mentioned in A.E., Dr. Giesswein, president of the Hungarlanda Esperanta Societo, gave a propaganda lecture before the Budapest Parliament. At its conclusion four members of Parliament joined the Society.



## CHICAGO—JULY, 1914

The plans for the coming EANA Congress are in full swing and rapidly nearing completion. The Chicago Esperantists are intending to fairly outdo themselves in their efforts to show the hospitality of the Second City, and we will be an ungrateful lot indeed if we do not appropriately respond.

Dr. Simonek, the EANA Councillor for the Division informs us that in addition to the regular sessions of the Congress, there will be an opera in Esperanto, a concert, grand ball, excursion on the lake, and numerous other features. Can you afford to miss taking part in the largest and what promises to be the most successful EANA gathering yet held? This is an important event in the history of the organized movement in this country. EANA has brought together a strong force of willing and able individuals, each clamoring for a share in its work. The results of individual effort under the guidance of the Central Office have become immediately apparent, and while cooperation via Uncle Sam's mail service is satisfactory enough when nothing better is in sight, here is our opportunity to meet our fellow workers and enthusiasts and give and receive help, suggestions and experiences to better prepare us for the fight. Chicago, the logical point, in the heart of our great continent calls us for our summer vacation. Parties are already planning "karavanoj" in many places, and we want **you** who have as yet thought little of the matter to get busy **right now**. We think the Westerners will in no way permit the folks "Down East" to outnumber them and we want to hear from the leaders of the various groups and from isolated individuals as soon as possible about their plans.

For the Easterners it has been suggested to secure special cars at New York City, a good place of meeting for both the Northern and Southern travelers. It is important that we know immediately if you are at least thinking about going, in order that the furtherance of such plans may be contemplated.

We have not yet mentioned those centrally located, but as it is really their "show" it's up to them to see that they travel Chicago-ward in full force. Those West of Chicago we can put in touch with far-West samideanoj, and in the east the special-car contingent will be glad to take them up en route.

Now is the time to consider this matter. Don't wait until May or June before you begin. **Do it now**, and show that you're proud of your

movement and of the splendidly successful Congress, which is going to achieve such success through your efforts.

Its up to each one of us! Will you do your part?

CHICAGO—JULY, 1914

### LA TRI ALTAJ AMERIKANOJ

Iam tri Amerikanoj, S-ro Goodwin, ses futojn alta, Doktoro Phillips Brooks, ses futojn, du colojn, alta, kaj Doktoro MacVikar ses futojn, kvar colojn alta, alveturis al Londono, kaj restante tie, ili aŭdis ke en Salono iu sinjoro faros paroladon pri Amerikanoj. Ili aliris al la salono, kaj sidante aparte aŭskultis la paroladon de tiu sinjoro. La parolanto dum sia parolado diris ke "La Amerikanoj estas malaltaj homoj. Tre malmultaj estas pli altaj ol kvin futojn, dek colojn." Ĉe fino de la parolado S-ro Goodwin leviĝis kaj diris "Mi estas Amerikano, kaj mi estas ses futojn alta, kaj kie mi loĝas, pli altaj ol mi homoj estas nemalmultaj." Poste leviĝis Doktoro Brooks kaj diris "Mi estas Amerikano. Mi estas ses futojn, du colojn, alta, kaj en mia parto de Amerika lando homoj pli altaj ol mi estas multaj." Tiam la aŭdantaro komencis ridi. Sed kiam ses futojn, kvar colojn, alta Doktoro MacVikar leviĝis kaj komencis diri "Mi estas Am—," tiam la aŭdantaro kriegis kaj ridegis tiel ke Doktoro MacVikar estis devigata sidiĝi, ne povante diri alian vorton. Tio estis la venko de tiu "pri Amerikanoj" parolinto.

Tradukis Pastro A. K. Gurney.

### PENSOJ DE SAĜULOJ

Cicero.—Perforto estas rajto de bestoj.

Plato.—Virta homo estas tiu kiu havas energion por plenumi siajn devojn.

Aristotle.—L' amiko estas animo loĝanta en du korpoj.

Sarmiento.—Nesciulo estas pli timinda ol bandito.

Tradukis Armando Castilla,  
Santiago, Chili

## RADIO-TELEGRAFIO

aŭ ordinare nomita

## SENFADENA TELEGRAFIO

Grandan miregon ĝi kaŭzis, kiam antaŭ pli ol sepdek jaroj oni eltrovis, ke, per rimedo de la elektra fluo laŭ metala fadeno, oni povis transsendi aŭ videblajn aŭ aŭdeblajn signalojn kaj tiamaniere rapidege, preskaŭ sammomente interkomuniki trans grandaj interspacoj.

Baldaŭ estis eltrovite, ke sola fadeno sufiĉas, kaj ke la tero povas anstataŭi la ceteran fadenon. Tiel oni telegrafas ankoraŭ je la nuna tempo. Ĉi tiun telegrafmanieron oni do povus nomi "Unufadena Telegrafio."

Sed multegajn kaj profundajn sekretojn ankoraŭ eltrovotajn enhavas la naturo. Oni sciigis, ke la tuta naturo estas sistemo de diversaj vibradoj; ke ĉi tiuj vibradoj, laŭ Sir Oliver Lodge, estas elektraj kaj la fundamento de la tuta sentebla naturo. La pli malpli malrapidaj vibradoj estas ĉi tiu sentebla naturo; la plej rapidajn vibradojn ordinare ni ne povas senti. Estas kelkaj el la rapidegaj, kiujn ni sentas, ekzemple: ni povas vidi kelkajn lumradiojn, aliajn ni ne povas vidi; estas sonvibradoj, kiujn ni ne aŭdas. Perturbo de la aero, sufiĉe forta, naskas sonajn ondojn, kiuj havas rapidecon de proksimume 333 metrojn, 1090 futojn po sekundo; elektra perturbo en la aero, aŭ pli bone, en la etero, naskas ondojn, kies rapideco estas 300,000 kilometrojn, 186,400 mejlojn; tia ondo ĉirkaŭiras la teron 7 kaj 1-2 fojojn en unu sekundo.

Tiaj ondoj estas kaŭzitaj same kiel ondoj en malgranda lageto, kiam oni ĵetas ŝtonon en ĝin. Ĉirkaŭ la loko perturbata, kie la ŝtono falis en la akvon, ringformaj sulkoj naskiĝas, fortaj apud tiu loko, pli kaj pli malfortaj malproksimiĝante. Tiuj ondoj ne transiras la lageton de la centro ĝis la bordo, sed ĉiu naskita ondo perturbas la apudan akvon kaj tiel naskas novan ondon. Multe da energio estas tiel perdita per la estigo de novaj ondoj kontraŭ la denseco de la akvo, tiel ke fine ili tre malfortiĝas.

La sama okazas ĉe senfadena telegrafio. La sparko, kiu havas rapidegan oftecon kaj altegan tension perturbas la aeron ĉirkaŭ si, kaj en etero samformaj ondoj estas naskitaj apud ĝi, kiel ĉe la ekzemplo pri la ŝtono kaj akvo. Tamen, ĉi tiuj ondoj disvastiĝas sfero ĉirkaŭ la sparko, oni povas do kompreni ke nur tre malgranda energio trafas la detektoron de la etera telegrafa instrumento. Eble la sen-

fadena telegrafio bezonas miloblan povon de la fadena, ĉar la ondoj kiuj ne trafas la detektoron estas tute perditaj. Pro tiu malgranda funkciada povo estas necese, ke la detektoro estu treege senteca.

La detektoro, unue elpensita, estis la Branly tubo, nun nomata "koherilo." Estas la sola senfadena telegrafia detektoro, per kiu oni povas funkciigi aliajn aparatojn, ekzemple la Morse presilon, aŭ eksplodi batalŝipojn el la distanco. Sed ĝi estas efektiva nur por malgrandaj distancoj, eble 80 kilometrojn. La nune uzata detektoro estas samtempe pli efika, pli senteca kaj simpla; sed oni povas uzi ĝin nur per la helpo de telefona aŭdilo; la aŭskultanto ricevas orele la senditajn.

A. Mayer.

---

### SUR NIA TABLO

---

IDO kaj PERF-IDO. Kiam mi komencis redakti ĉi tiun fakon mi promesis ke mi ignoros la " eminentulojn " inter la ĵurnalaro, kaj min turnos al la " ceteraj. " Tamen, lastatempe du el la plej gravaj " eminentuloj " pritraktas longe tian gravan aferon ke mi ne povas tute resti je mia unua sinteniĝo. Estas veraĵo, aŭ tradicio,—mi ne scias kiun el la du, ke la struto, je la alproksimiĝo de danĝero, reala aŭ suspektata, kaŝas sian kapon sub la sablon kaj atendas, aŭ subitan morton, aŭ la forpasadon de la minacanta afero. Kion faradas la struto, tion la plejparto de nia ĵurnalaro kaj la plejparto de ni mem estas farinta, rilate tiun kankron, kiu minacas ne sole Esperanton, sed ankaŭ la tutan aferon koncerne la sukcesplenan starigon de internacia helplingvo. Kune kun aliaj abomenaĵoj, kaj delikataj aferoj, ni tute ignoris la malhonestan kaj perfideman agojn de la tiel nomitaj Idistoj, kaj ĝisnune,—almenaŭ malkaŝe, plejeble malofte malpurigis niajn lipojn per la vortoj "Ido" kaj "Idistoj."

Estas domaĝe ke ni devas dividi nian tempon inter la propagando kaj la defendo de nia kara lingvo, sed, tia estas la agado de niaj malamikoj ke, plua silento estas netolerebla, kaj restante tute silenta ni malzorgas nian devon al Esperanto. Ĉar ni devas batali, estas dece ke ni posedu bonegajn kaj efikajn batalilojn.

Defendilon ni ricevis kiam aperis la grava verko "Historio kaj Teorio de Ido," kaj kvankam tiu libro estas jam recenzita en ĉi tiu gazeto, mi ree volas konsili al ĉiu propagandisto kaj amanto de Esperanto ke li zorge legu kaj elstudu tiun verkon.

Kvankam kelkaj el niaj pli kuraĝaj gazetoj jam diskutis la malpermesitan temon, estas du, kiuj meritas specialan notadon, kaj (bedaŭre ne plenan) recenzon de la aperintaj artikoloj.

Unue, en "Ondo de Esperanto," Nov. 1913, sin trovas artikolo, titolita "Nia Lanterno," letero kaj citaĵoj de la Majstro mem, kaj kiuj plenigas preskaŭ kvin paĝojn de "Ondo." Jen kelkaj paragrafoj, kiuj sin klarigos. \* \* \* \* "Vi demandas min, kial mi kaj preskaŭ la tuta esperantistaro subtenis la aranĝintojn de la tiel nomata 'Delegacio'; la respondo estas tute simpla: ĉar dank' al la konstantaj kaj sennombraj asertoj de S-ro Couturat ni havis plenan konfidon al li, ni estis plene konvinkitaj, ke li havas la plej purajn intencojn, ke li laboras senambicie nur por la fortikigo de komuna interkonsento kaj interhelpo, kaj ĝis la lasta momento ni ne havis eĉ la plej malgrandan suspekton ke li havas ian kaŝitan intencon. \* \* \* Neniu el ni povis eĉ por unu momento suspekti, ke kaŝite estas preparata por ni ia surprizo, ke baldaŭ, kiam S-ro Couturat pensos, ke li estas sufiĉe forta, li subite ŝanĝos la tonon kaj diros: la plej alta aŭtoritato, kiun devas obei ĉiuj mondlingvanoj estas **mi kaj miaj kunuloj**; neniigu ĉion, kion vi ĝis nun akiris per malfacila laborado kaj rekomenca la laboron tute denove laŭ **niaj** ordonoj." Dro. Zamenhof tiam parolas pri longa interkorespondado kun S-ro Couturat, pri siaj timoj rilate la malhelpon al Esperanto pro la ebla agado de la "Delegacio," kaj mencias la ripetitajn certigojn de S-ro C. ke li laboros nur por la utilo kaj profito de Esperanto, kaj cedas al liaj petoj ke li helpu influi S-ro Boirac ke li estu unu el la delegacia komitato. Fine, li citas el-tiraĵon el letero de S-ro Couturat, datumita 18 Jan. 1907, en kiu sin trovas la jenaj paragrafoj: "Kaj jen kiel oni prezentus la aferon al publiko. Kompreneble, nia Komitato ne deklaras, ke ĝi 'elektis' Esp. inter ĉiuj ĝiaj konkurantoj, aŭ akceptis ĝin kun kondiĉo ke oni faros en ĝi tiun aŭ tiun riparon; tio estus evidente tro malsaĝe kaj tio ne nur, kiel vi diras alportus malbonon al Esp. sed ankaŭ tute senefikigus la decidojn de la Komitato. Ne, ĝi redaktus sian decidon en la senco kaj proksimume en la formo, kiun vi indikas kaj deziras; ĝi deklarus laŭte, ke Esp. estas la sola L. I. akceptebla kaj praktikebla la sola respondanta al ĉiuj bezonoj, kiu jam pruvis tion k.t.p. kaj ĝi rekomendus tre tre klare akcepti ĝin tia, kia ĝi estas, en la lernejoj kaj en la oficialaj institucioj, kaj ĝi farus tuj la paŝojn necesajn por okazigi tiun akcepton."

Rilate la akcepton de S-ro Boirac, S-ro C. plue diras en sia letero: "S-ro Boirac havos tre grandan influon per sia kompetenteco Esperantista, kaj per sia diplomatia lerteĉo, kiun vi vidis uzata en Bulonjo. Li gvidos la diskutojn eĉ ne montrante tion, kaj scios ilin turni al la

bono de Esp. Invitante lin en nian komitaton, ni donas al Esp. ne nur ateston de simpatio, sed ankaŭ garantiaĵon de certa sukceso. \* \* \* Kun li ĉio iros bone por Esp.; sen li, ni pri nenio estas certaj, ĉar al ni mankos la apogilo en la interno de la Komitato.”

La neniigo de ĉiuj promesoj kaj ĉiuj certigoj, antaŭe faritaj de la Delegacio, estas nun afero de skribita historio, kion scias, aŭ devus scii, ĉiu vigla Esperantisto. El malhoneste kaj perfido ĝi naskiĝis; malhoneste kaj perfide ĝi agadis, kaj malhonore ĝi mortiĝas,—aŭ mi devus diri mortiĝis, ĉar la dua alreferata artikolo pritraktas la morton, aŭ la antaŭmortan putriĝon de la Delegacio.

En Oficiala Gazeto, Dec. 1913a, paĝo 87 ĝis paĝo 102, sin trovas “Protesto de anoj de la Delegacio por la alpreno de helpa lingvo internacia.” Tiu protesto estis publikigita dum la jaro 1910, estas subskribita de 27 eksdelegitoj; 32 subskribintoj al petskribo sendita al la Akademioj. Estas ankaŭ listo da 15 gravaj societoj kiuj oficiale konigis sian ekŝigon el la Delegacio kaj 9 ekŝiĝaj leteroj, kaj de societoj, kaj de privatuloj, inter kiuj estas tiu de S-ro Profesoro Wilhelm Foerster, Honora Prezidanto de la Delegacia Komitato. Plena legado de la citata artikolo estas konsilata.

La sinteniĝo de la Idistoj estas klare montrata per citaĵo el letero, ricevita de mi antaŭ tri jaroj, skribita de Usona eksesperantista Idisto. “En la daŭro de du jaroj, Esperanto aŭ mortos, aŭ kapitulacos.”

Nur Dio kaj la Idistoj mem konas la finan motivon de la “ikono-klasta” movado, kaj mi forte dubas ĉu eĉ la Idistaj satelitoj havas ideon pri la motivo de la estroj, al kiuj ili cedas, kaj kiujn ili blinde sekvadas, simile al ŝafaro trans la rando de krutaĵo.

Laŭ mia observado, estas du klasoj da Idistoj; perfiduloj, kaj trompitaj malsaĝuloj. Ĉiu el la du egale minacas la progreson de Esperanto. De nun, estos necese ke ni rigardu la ambaŭ klasojn kiel intencajn, aŭ nevolajn malamikojn el Esperanto, kaj ne sole al Esperanto, sed ankaŭ al la sukcesa starigo de iu helplingvo. De nun, ni ne faros nian plenan devon al nia propagando, nesciinte la veron, kaj ne helpante la bataladon, jam komencitan de nia plej konfidindaj eminentuloj. Ni levu niajn kapojn el sub la sablo kaj kontraŭstaru tion, kio profitas nek al si mem, nek al la mondo.

### KUKULIDO

Post mallonga vivo ĉi tiu birdeto mortis antaŭ kelkaj semajnoj. Mi ne estas hipokritulo, tial, mi ne povas esprimi ion krom ĝojo, pro la malapero de tio, kio neniam devus ekzisti. Anstataŭ elekti neston kaj plumojn de aglo, kukulino estis trompata de nesto kaj plumoj de

vulturo, birdo kiu de malproksime iom similas al aglo, sed kiu tute ne taŭgas prizorgi kaj nutri ĝentilan birdeton. Kukolido havis neniun lokon en Usono, kaj ĝi bone plenigas tiun lokon!

Tio, kio estas vera pri Kukolido, tute ne estas vera rilate al ĝia angla fratino, "The Esperanto Monthly." Sub sia propra nomo, eldonata por sia propra Asocio, la gazeteto havas difinitan lokon inter la instruaj eldonaĵoj, kaj kiel tia, ni povos rekomendi ĝin al la Esperantistaj lernantoj, kies patrolingvo estas la Angla. Tiel longe kiel ĝi povos kontentigi sin per taŭgaj celoj, kaj taŭgaj metodoj, ni volos al ĝi sukceson. Estus domaĝe se pro manko de subteno oni devos forlasi ĝian eldonadon. Alian tempon ni pli detale recenzos ĝin.

Ko Fo.

---

? ? ? ?

---

I see many comments in A. E. about "acrobatic" sentences. If the different nationalities have different order for words, what is to decide whether a sentence is "acrobatic" or not, and what guide shall we follow?

The first thing to do is to use what seems correct from the instinct of your own language, except where you have discovered that your own language is odd and idiomatic from the point of view of others. The second is to **avoid** imitating the peculiar things you read in the writing of foreigners, instead of noting down the queer expressions and trying to acquire them. The primitive word order of most languages is roughly this: subject, verb, predicate. The object generally follows the verb, unless it happens to be an unemphasized pronoun such as *min*, *vin*, *sin*, *tion*, etc., when a position just before the verb is more natural. Short modifiers precede, but a whole phrase used as a modifier, like "the over the page scattered commas," should almost always follow the noun, instead of separating the article from the noun. Relatives and antecedents should be as near together as possible. Change from the natural order should not be indulged in except for some clear reason of emphasis, clearness or euphony. For instance, *Mi donis la libron al li, kiu la aferon priskribis*, is both ambiguous and unnatural. It should be *Mi donis al li la libron, kiu priskribis la aferon*. Again, *Li sendis la de li legitan libron*, should be simply, *Li sendis la libron legitan de li* (or *kiun li legis*); otherwise it reminds the reader of a person trying to hum a song whose words he has so completely forgotten that he sings it "la de dum da," etc.



## NOVAJ LIBROJ

Antaŭ ol kuŝiĝi, la hundo sin turnas per multaj cirkloj. Por tia agado ĝi havas nenian kaŭzon, krom ke same faris ĝiaj praavoj.

Multe same ni heredis la anglan recenzon de esperantaj libroj. Kiu ne povas legi Esperanton, tiu havas nenian bezonon de sciado pri ili, kaj ĝentileco postulas ke pro la neanglaj aŭtoroj, kaj la rapide kreskanta nombro de niaj alilandaj abonantoj, ni estonte recenzu esperante,—escepte, eble, kelkajn anglajn lernolibrojn.

**ORIENTA ALMANAKO**, 90 paĝoj, 50 cendoj.

Unu el la plej gravaj el la 1913aj aperintaj libroj. Kolekto de esperantaj tradukoj el verkoj de diversnacie orientaj aŭtoroj. Krom la propra intereso de la rakontoj mem, la kolekto faras bonegan propagandilon por la montrado de la utilo de Esperanto, en la kampo de literaturo. Laŭ permeso, kaj sugestio de la redaktoro, unu el la rakontoj jam estas tradukita angle kaj publikigita en unu el niaj plej gravaj gazetoj, "The Outlook."

**ELZASAJ LEGENDOJ** (Int. Bibl. No. 28), 10 cendoj.

Kolekto de popularaj rakontoj, pli-malpli interesaj, pli-malpli bone tradukitaj.

**TRAVIVAĴOJ DE RO ŜO**, 93 paĝoj, 47 cendoj.

Lerta estas la aŭtoro, kiu povas verki interesan biografion; ankoraŭ pli lerta, tiu, kiu povas verki kontentigan aŭto-biografion. Ni povas gratuli al Sro. Sharpe pro interesplena kolekto de personaj travivaĵoj; verkitaj per la plej bona stilo. Loĝinte en multaj landoj, konante multajn lingvojn, li tamen trovas utila la esperantan lingvon, kaj donas al ĝi sian plej altvaloran trezoron, sian vivhistorion. La libro estas instrua, amuza, kaj tute inda de ĝenerala legado. Plie, ĉar la tuta profito de ĝia eldono estas donota al Esperanto ĉe la Blinduloj, ĉiu Esperantisto devus kalkuli la "Travivaĵoj" inter sia libraro.

**ALEGORIOJ EL LA NATURO**, 47 paĝoj, 20 cendoj.

Kiom malmulte plaĉis al ni "Kamena Angulo," tiom multe plaĉas al ni ĉi tiu libreto, de la sama tradukinto. Kvar ĉarmaj alegorioj, plej lerte verkitaj kaj plej lerte tradukitaj. Se estas iu elekto inter la kvar, eble "Ne perdita, sed foririnta antaŭe" estas la plej pensiga. Larvo



de libelo demandis sin, kien iras la rano kiam ĝi malaperas super la akvo. Unu post alia, gefratoj de la larvo rampas al la akva supraĵo, kaj promesinte reveni, neniam revenas. Fine, li mem, ankaŭ promesinte reveni "iris supren tra la malvarma akvo al la kreskaĵoj, kiuj borderis ĝiajn flankojn; kaj per folio de orkolora ranunkulo li levis sin el sia akva hejmo en la aeran mondon, en kiun penetri la okuloj de libela larvo ankoraŭ ne povas." Oni ne povas legi la alegorion, ne pensante kiel forte ĝi predikas pri postmonda vivo, eĉ sen ia tia aludo. Egale pensigaj estas la ceteraj de la kolekto. Pro ĝia propra indeco, pro la bonstila Esperanto, la libreto bone taŭgas legadon kaj studadon de mezlerata studento.

MALLONGA BIOGRAFIO DE HENRY FAWCETT, 25 cendoj.

Simpla kaj bela rakonto de triumfoj de blindulo, kontraŭ siaj fiziologiaj malhelpoj. Vera kuraĝigilo al samsuferantoj, kaj incitilo al pli fortunaj. La Esperanto estas ankaŭ simpla kaj bonstila. La profito de ĝia vendado estas al "The New York Association for the Blind."

Ankaŭ ricevitaj; Esperantista Poŝkalendaro; Stirio; En la Montoj; Vojaĝado en Finnlando; En la Lando de la Blanka Monto; Greklingva Vortaro.

Oni parolis pri la knabinoj. "Diru!" diris McFarland. "Ĉu vi iam estas enirinta restoracion kun knabino por manĝeti kiam ŝi estis iomete malsateta?"

"N-ne," diris Smith malrapide.

"Nu, akceptu mian konsilon kaj ne faru tion. Unu tagon mi eniris restoracion kun fraŭlino. Unue ŝi rifuzis manĝi ion, sed poste ŝi diris ke ŝi opinias ke ŝi ja estas iomete malsateta."

"Ĉu ŝi manĝis ion?"

"Ĉu ŝi manĝis ion? Ŝi kaptis la menuon, ekrigardis ĝin, diris ke ŝi ne sentas sin tre malsata kaj mendis."

"Nu, kion ŝi mendis?"

"Ŝi mendis ostrojn, buljonon, omaron, kotletojn, pankreason kaj pizojn, kokidaĵon, salikokan salaton, biskvitojn, makaronion, kafon, kaj kremon de mento. Kostis tri dolarojn al mi."

"Nu, vi devis ĝoji."

"Ĝoji? Kial?"

"Tial ke ŝi ne estis malsata."

—Pittsburg Chronicle Telegraph.



## LA VAGANTOJ

La famkonata Marconi sukcesis lumigi elektran lumilon je distanco de ses mejloj per senfadena fluo provizita de 100-ĉevalforta maŝino. Li esperas ke la eksperimento sin provos la antaŭkuriero,—eble ne dum la nuna jarcento—de senfadena lumigado kaj hejtado de domoj.

S-ro Bonar Law, parolante en la Brita Parlamentejo, avertis Ĉefministron Asquith ke la aprobo de la pri irlandia sin regado estus komprenata de Ulster kiel deklaro de milito.

Pli ol 45,000 homoj estas senokupaj en suda Francujo, rezulto de la eljeto de kelkaj paragrafoj el la pensia leĝaprojekto por la Organizo de Subteraj Laborantoj.

Sankta Gingolph, urbeto sur la borderoj de Lago Geneva, estas la kaŭzo de interesa eta internacia problemo. Unu parto kuŝas en Franca regiono, alia parto apartenas al Svisujo, kaj iun restajon oni posedas komune. Depost 1600 ĉi tiu komuna lando estis la subjekto de malpaco, kaj kunvenoj por trovi solvojn de la afero komenciĝis en 1851. Ĉi tiun ankoraŭ oni ne finas, sed kaj la Franca kaj la Svisa registaroj nun penadas alveni al iom difinita komprenado. Loka strangajo estas la fakto ke dum la Francaj loĝantoj transiras la Svisan landlimon por alveni al preĝejo, la Svisanoj invadas en Francan regionon por Diservo.

Oni kalkulas ke oro, valorita je proksimume Sm. 20,000,000 estas bruiligata ĉiujare en Ĥinujo, ke oni festas kelkajn datrevenojn per la detruado de pecoj da orfolio.

En Usono dum ĉiu labora tago de la jaro, apartenaĵo je la valoro de Sm. 2,000,000 estas detruita, tri homoj mortas, kaj 17 personoj estas grave difektitaj pro fajro.

“Kiel terure vi ronkis hieraŭ nokte.”

“Jes. Tio estas heredita.”

“De viaj gepatroj?”

“Ne. Mia avo funkciigis segejon.”

“Ho, paĉjo,” ekkriis juna knabino, “tiu kreskaĵo kiun mi havis starantan sur la fortepiano estas morta.”

“Nu, mi ne miras,” diris la patro.

## EVITANTE LA DEMANDON

Mastrino—Ĉu vi estas bona kuiristino?

Petantino—Jes, sinjorino. Mi ĉeestas la preĝejon ĉiudimanĉe.

## PRESA ESPERANTISA SOCIETO

33, RUE LACÉPÈDE, PARIS

La plej malnova el ĉiuj esperantaj gazetoj (fondita en 1895).

Plej enhavoriĉa! Plej klasika!  
Plej malnova!

## Lingvo Internacia

Centra organo de la Esperantistoj. Ĉefredaktoro Th. Cart. Aperas regule ĉiumonate: 48 pĝ. da plej bona teksto! Jara abono 5 fr. (2 Sm.). Specimena numero por unu respondkupon.

## Juna Esperantisto


Sola esperanta gazeto por la gejunularo! Fondita en 1903.

Monata Gazeto Belektristika por Junuloj, Instruistoj kaj Esper.-Lernantoj. Redaktoro P. de Lengyel. Jara abono 3 fr. (1 Sm. 200). Specimena num. por unu respondkupon.

Lingvo Internacia kaj Juna Esperantisto kune j. ab. 7 fr. (2 Sm. 800).

## PRINTING?

WE DO IT



LINOTYPE COMPOSITION A SPECIALTY

The  
American Esperantist Co., Inc.  
West Newton, Mass.

### At Last, A Real Footease

Simpson "Higena" Sanitary Innersole easily placed inside your shoes. Immediately relieves tired, aching feet and chilblains. Positively cures callous and keeps your feet warm during the Winter. Trial pair will convince you. Send size of shoe.

Price 25c.

Mailed 30c.

Maker, ALBERT E. SIMPSON,  
39 Webster St., Lynn, Mass.

HAVE YOU READ  
LA MOPSO DE LIA ONKLO?  
A LAUGH IN EVERY LINE!

15c Postpaid

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., INC.

## THE WHOLE OF ESPERANTO

EXCELLENT PROPAGANDA MATERIAL      ORDER TODAY

5c per copy

10 for 25c

50 for \$1.00

Contains Grammar, Vocabularies and a Little Story. Just the thing to interest your non-Esperantist friends.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., INC.,

West Newton, Mass.



## ĈU VI DEZIRAS ENIRI EN

la Templon de Muziko kaj ĝui intiman komunumon  
kun la famaj majstroj?

Ĉe la EMERSON aŭtomate ludata fortepiano  
vi trovos ŝlosilon kiu ne nur malfermos la pordojn  
sed ankaŭ farigos vin membro de la granda familio  
muzika kun ĉiuj rajtoj kaj privilegioj ĝiaj.

Petu katalogon esperante.

Vendistoj en ĉefaj urboj kaj urbetoj.

**EMERSON PIANO CO., Boston, Mass.**